

PIV-IDO: VASTA VORTARO ESPERANTO-NEDERLANDA

PIV-ido nomiĝas la Vasta vortaro Esperanto-nederlanda, ĉar ĝi enhavas ĉiujn kapvortojn el PIV, kun la ĝusta nederlanda traduko. Eĉ pli, ĝi enhavas amason da utilaj kaj bezonataj kunmetaĵoj; dum 18 jaroj preskaŭ ne pasis unu tago sen ke aldoniĝis kelkaj vortoj, ofte el la ĉiutaga vivo, al la vortaro.

Ĉu vi scias, kio estas ŝutrotenilo, ŝutrofiksilo? Se vi konas la vorton ŝutro, vi verŝajne povos imagi. Ĉu vi scias, ke en la nederlanda ĝi nomiĝas 'luikhouder' aŭ 'luikensoldaat(je)'? Ĉu vi scias, ke aĉaro en la nederlanda estas 'atjar'? Ke ĉopsuo en la nederlanda skribiĝas 'tjaptjoi'? Se vi ne scias, la vortaro instruos al vi.

La vortaro donas ankoraŭ multe pli. Se vi trovis, eble hazarde, ke por indiki ke io, kion oni senpaciencie atendas, ne jam realiĝis, oni en Esperanto diras: ĝi ankoraŭ ŝvebas... vi ankaŭ tre klare estos direktata al deko da aliaj PIV-aj Esperanto-esprimoj kiuj havas la saman sencon.

Eĉ en la direkto nederlanda-Esperanto ĝi povos esti utila! Pro la radikobazeco, Esperanto-vortaro ĉiam estas iel nocio-vortaro; la artikoloj grupigas familion de vortoj. Tial vi facile povos trovi ke 'windei' estas senŝela ovo, kaj ke 'hanenei' estas senflavaĵa ovo.

Se vi serĉas la nomon de iu terpomaĵo, vi trovos ĝin ĉe pomo, terpomo... Se vi bezonas nomon de iu saŭco: ĉe saŭco vi trovos ĉiujn. Kaj supoj same abundas.

La angla-Esperanta vortaro de Peter Benson instigis min aldoni al la vortaro tradukon de iu bildlingvo. Dum legado oni ja renkontas tiom da "tutmondaj signoj" (ekzemple: saĝetojn), kiuj ne ĉiam estas facile vorte tradukeblaj... Kie oni trovu la vortojn? Nu, en vortaro!

Petro Desmet'

Verkis: Petro Desmet'

Kontribuis: Rob Moerbeek, Yves Nevelsteen, Lode Van de Velde

Formo: libro glubindita

Prezo € 59.00

Paĝoj: 1040

ISBN: 978-90-77066-65-2

www.retbutiko.be/eo/ero/pivi

